

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencej

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 71 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 majo 1926

ESPERANTO AND WIRELESS.

The progress in the wireless world is uninterrupted. Almost all the important broadcasting stations in Europe and many in Amerika, Asia and Australia, hold courses in Esperanto or broadcast in that language. Some of them have weekly programmes entirely in Esperanto for the benefit of foreign listeners.

Statistics show, from 1 January 1923 to 1 April 1925, 118 lectures (68 on Esperanto and 50 in Esperanto) and 20 lessons were broadcast from 50 stations in 19 countries in 3 continents. Since then the number has considerably increased. The Tokio station now takes part in the dissemination of Esperanto by wireless.

—I.E.S.

ESPERANTO IN THE RAILWAY SERVICE.

The General Directorate of the Swiss Federal Railways, by a Service Order of 10 November 1925, informed its administrative services that it was prepared to give to persons attending Esperanto courses the same facilities as for the study of other foreign languages.

The General Directorate of the Austrian Federal Railways, by Service Order (7.XI.1925 No. 52, Act. 3407) recommended the study of Esperanto. It also, by way of exception, allows railwaymen speaking Es-

peranto to wear the Esperanto star while on service.

—I.E.S.

ESPERANTO IN 100 COUNTRIES.

Esperanto is now disseminated in 100 countries. The Universal Esperanto Association (Universala Esperanto Asocio) in Geneva, whose object is the practical application of the international auxiliary language, has members at the present time in 82 different countries.

19 international reviews and 40 national journals form a permanent link between Esperantists throughout the world.

At the beginning of January 1926 the first South American Esperanto Congress was held in Montevideo and was attended by 200 persons.

For a year past special organs have appeared in India (in English and Hindi) in Java (in Dutch, English and Malay) and in Palestine (in Hebrew).

ESPERANTO AND THE FAIRS.

The Leipzig Fair has just published a 15-page illustrated prospectus in Esperanto. During the Fair a special meeting of business men from various countries was held, the proceedings of which were conducted in Esperanto.

The 10th Vienna (Austria) Fair is announced by a printed poster, which has just appeared in Esperanto.

I.E.S.

PRI "ORIENTO."

Estas bedaŭrinde scii, ke pro politika kialo la 100-paĝa gazeto "Oriento" ne plu presigos ĉe Harbino, kie ĝis nun laborema areto kompilis ĝin, la plej grandformatan Esperantan gazeton presita de kiam la "Revuo" de Bourlet devis ĉesigi. La trian numeron oni forte penas presigi aliloke ol en Mangurio, sed ĝis nun ne sukcesis. Espereble, kiam ĉi tio estos legata la afero bone estos solvita kaj la tria enmanigita ĉe ni. La duan ĵus traleginta mi notas la jenan.

Kun la escepto de certaj elhinaĵaj rakontoj, kiun mi ne povas kredi tipaj, kaj bonaj spegulantoj de la Ĥina literaturo, la enhavo estas, laŭ mia opinio, presinda; vidate larĝe, kvankam eble ne tro alloga por la meza homo. Kiu ne ŝatas ensorbiĝi je pedagogio, Aĉinu'a vivado, stato de Koreaj virinoj k.t.p. Ankaŭ la lingvaĵo ne estas tute plaĉa. Formoj kontraŭ konsilitaj de Zamenhof estas libere uzataj—"lernantoj la lingvon" k.c. La stilo estas kelkloke iom peza, ne havante la frazan belformecon kaj unuavidan kompreneblecon, kiu karakterizas la verkadon de, ni diru, Luyken aŭ Forge. Tia pezeco ŝajne estas oftaĵo ĉe Orientanoj, tamen estas nur supraĵa nebonaĵo, facile forigebla per pliproksima kunesto kun alilandoj kaj pli profunda legado de la Okcidenta literaturo.

Iom mi inklinas kredi s-ron Serišev prava en lia sinteno rilate la proponon malpliigi la gazetaron. Se oni aĉetas milon da ekzempleroj de ĉiu numero de "Oriento"—kaj estas kred-eble ke oni tion faris ĝis nun—granda bono jam okazis por nia movado. Tiaj aĉetantoj tre verŝajne ne abonas Eŭropan gazeton.

Pri la enhavo. Estas iom longa kompilaĵo de fama Rusa Orientalisto pri la fruega Ĥina historio, kompreneble malaktuala, kaj pro tio ne interesa ĉe multaj, kaj valoraĵoj precipe por la specialistoj. La legantaro pli ŝatos rakonton de malliberigo, malkaŝante la degradecon de la Ĥina punsistemo kaj la kruelecon kaj subvendemon de la figvardistoj, en tiu vivmortejoj. Skizo de Komerca Vivo en nuntempa Ĥinuĵo havas pli da nuntempeco, Antaŭmensigante bildon ridetindan de la superstiĉemo de la negocistaro Ĥina.

La Aĉinu'a skribaĵo estas valora pro tio, ke ĝi estas la unua verkaĵo de Aĉinu'a mem. "Fundamento de Jap-

ana Eduksistemo" de la plumo de s-ro Serišev, estas interesa klarigo de la spirito de Buŝido, aŭ Japana kavaliereco. Kvin verketoj pri Formosa, plejparte akompanantaj de bildoj, pritraktas tiun insulon, kies sovaĝajn loĝantoj dum longa tempo iom post iom malvenkiĝas sub la Japana premado. Ankaŭ troviĝas en tiu sekcio, rakonton, "Mia pasinta vivo," verkita de juna Formosano, kiu emas enmondigi sian junularan travivaĵaron.

"El la Silenta Oceano" temas la moralecon de la loĝantaro sur tiuj insuloj troviĝantaj en la Pacifiko, kaj certas interesos la misiistaron. Longa artikolo pri malmulte konata temo estas "Lamaismo: Medicino kaj Doktrino." La lukto inter la superstiĉo de la Mongoloj kaj la Eŭropa medicinarto estas prituŝita, kaj la verko estos ĝue legata de tiuj havantaj antaŭe inklinton al tia legadmaterio. Kvar-kvin skribaĵoj en la Korea sekcio rilatas al la stato kompatinda de la Korea virino, eduko en tiu korego de Azio, tiea Japana agado, kaj estas dutri fabeloj, pli-malpli presindaj.

Estas notinde, ke "Oriento" enhavas liston da Rusaj verkoj pri Ĥinuĵo; kaj informas, ke kiu ajn ero estos tradukita Esperanten laŭmende, se intereso volas. La temaro estas certe posedinda por ĉiu Orientulo.

Finfine, ĉiu bonvolanto je nia afero, ĉiu vera deziranto, ke nia kara lingvo estu aŭdata ĉiufere, subtenu perabone, se tio estas ebla, la ageman batalanton, Pastro Serišev, en sia kuraĝa entrepreno, kaj laŭeble ĝustigu se necese la enhavon per konsilo kaj kritiko.

ROBO.

ESPERANTO AND THE POLICE.

It is common knowledge that in Barcelona, Berlin, Breslau, Budapest, Chemnitz, Dresden, Leipzig, Lisbon, Madrid, Montevideo, Prague, Rio de Janeiro and Vienna, there are police officers who speak Esperanto and wear a special badge on their uniforms distinguishing them as Esperanto interpreters. The Prussian Ministry of the Interior has instituted an enquiry (12.12.25-II M 2935/II) relating to police officers speaking foreign languages or Esperanto, with a view to distinguishing them in the same manner.

—I.E.S.

KRONIKO.

WELLINGTON, NOV-ZELANDO.

—Por helpi financi la Sesan Aŭstralazian Esperanto-Kongreso kio okazos ĉe Hobart, Tasmanujo; dum paskotempo 1927, s-ro W. H. King (Postal division, Secretary's Office, G.P.O. Wellington) nun laboras. Leteroj petantaj monhelpon estos dissenditaj frue. Nov-Zelandanoj kiuj volas donaci al la Kongresa konto estas petataj sendi pere de s-ro King.

S-ro W. H. King el Wellington, kies nomo estis ligita al Esperanto dum ok jaroj veturis tra la norda parto de Nov-Zelando antaŭ du-tri semajnoj. Estas notinde ke ĉie li iris oni postulis informon pri Esperanto; ĉe Whangarei, post persona intervuo kun la redaktoro de la loka tagĵurnalo invito estis ricevita por verki artikolon pri Esperanto. La artikolo estis presita laŭ vorte. Ĉie oni montris intereson kaj deziris klarigojn kaj informon pri la mondlingvo. Ĉe Auckland, S-ro King vizitis la klubon ĉe Remuero kaj trovis ke la dudek kvin membroj progresas bone kaj kun granda entuziasmo. Amikaro de verdstelanoj lin adiaŭis ĉe la stacio. Ĉe Auckland, Esperanto estas parolata flue kaj libere. S-ro King reportas ke publika opinio multe favoras al Esperanto, ankaŭ ke lia foriro el Auckland rememorigis lin pri la foriro post la Kvina Kongreso ĉe Melbourne.

AUCKLAND NOV-ZELANDO. —

La 21 marton okazis alia Esperantista pikniko, kio estis granda sukceso. Membroj el la Remuera Klubo veturis al Brown's Bay, marbordo de la Auckland haveno. S-ro J. S. Russell, malnova samideano, paroladis mal-longe; li ankaŭ donis legadon titolita "Monda paco kaj monda parolo." La geanoj de la Remuera Esperanta Klubo ankoraŭ kunvenas ĉiu lunde ĉe, 5 Aldred Rd.; bona progreso estas farata de la pli ol dudeko da membroj. Klaso fondita sub aŭspicioj de la Laboristara Eduka Asocio kaj gvidata de s-ro J. S. Russell, komencis dum 16 aprilo. La klasejo estas, Old German School, Symonds Str. kaj la klaso kunvenas ĉiu lunde je la 7.30 vespere. Ĉi tieaj samideanoj intencas frue atentigi la Edukan Departmenton pri la utileco de Esperanto, samtempe petante pri la enkonduko de Esperanto en la Nov-Zelandajn lernejojn. La redaktoro de la tagĵurnalo "Auckland Star" esprimis sin tre volanta presigi novaĵojn pri Esperan-

FIELDING, NOV-ZELANDO. —

Dum lasta jaro s-ro R. Ross gvidis klason, fine fondis Esperantan Klubon. La meza ĉeesto estas dudek. Ĉe tiuj kunvenoj oni parolas sole Esperante. Ifoje interesaj temoj estas debatataj. Tiu ĉi jaro la klaso ree komencis kun ĉirkaŭ dudek lernantoj. S-ro Ross paroladis al la anoj de la Feilding Komerca Ĉambro. La urbestro prezidis kaj post la parolado, parolis favore pri Esperanto.

MANGAHAO-HYDRO, NOV-ZELANDO.—Arangoj estas farataj kun la estroj de la Y.M.C.A. por fondi novan klason. La du entuziasmoj, McGuigan fratoj, kiuj kondukas la aferon, esperas komenci la instruon je frua dato; ili faras ĉion eblan por sukcesigi la aferon.

MELBURNO, V.—Dum la pasintaj semajnoj, la anoj de la Melburna Esperanto Societo estis tre bonŝancaj, pro tio ke, en la programo por la monato okazis du tre interesaj vojaĝrakontoj. S-ro Darwin donis tre lertan kaj detalplenan paroladon pri siaj spertoj en la Norda insulo de Novzelando, kie li pasigis* feliĉan libertempon. — S-ro Hudson daŭrigis sian rakonton pri Suda Ameriko, kaj portis la anojn, spirite, ĝis la malproksima kaj kurioza urbo, Asuncion, en Paragvaĵo, kaj priskribis pri la vidindaĵoj tie, kaj dum la surŝipa veturo sur la grandaj riveroj Rio de la Plata, Parana, kaj Paragvaĵo.

Je la deksepa de aprilo oni aranĝis ekskurson al la zoologia ĝardeno. Ĝi donis bonan okazon pligrandigi ĉies vortaron, kaj la posttagmezo pasis tre feliĉe, por ĉiu.

SYDNEY. — Elstarantaj okazintaĵoj dum pasinta monato estis:—1e. Reveno de nia mondkongresano, S-ro A. Feldmayr; 2e. Elekte de S-ro F. T. Simon ĉi-tiea sekretario por proponata Aŭstralazia kongreso en Hobart, Tasmanujo, dum Pasko 1927; 3e. Vizitoj de aliŝtataj samideanoj—S-ro W. C. Coghlan, el Townsville, Kvinslando, kaj S'ino Dixon, el Melbourne, Viktorio; kaj 4e. eksterordinare interesaj paroladoj de S-roj V. Rutland kaj I. Seriŝev. Jen la detaloj:—

Reveninte de al lasta Universala Kongreso en Genevo, S-ro Feldmayr atingis Sydney—on la 15a Aprilo per poŝtŝipo "Orama" kaj samvespere vizitis la klubejon por transdoni salutojn el Eŭropo. En senĝena 10 minuta parolado li donis impresojn de

Aŭstraliano inter ĉiunacianoj, menciante, inter alie, kelkajn kutimajn demandojn: "Kiel longe vi vojaĝis?" "Kiom da indiĝenoj (nigruloj) estas en via lando?" "Ĉu vi konas la bonegulojn S'roj Hudson, Drummond, Rawson kaj Pyke, kiuj partoprenis antaŭajn kongresojn?" k.t.p. Por ne okupi tro multe da tempo, S'ro Feldmayr prokrastis lian plenan raportan ĝis dato elektota dum majo, kaj la laŭprograma parolado sekvis.

Post legado de letero de Hobarta Esperanta Grupo pri okazonta sesa Aŭstralazia kongreso oni decidis nomi S'ron F. T. Simon kiel sekretario por Nov-Sud-Kimrujo, kies devo estos doni informon al individuoj kaj la ĵurnalaro, kolekti kotizaĵojn, kaj aranĝi karavanon.

Vizitantoj suprennomitaj estis bonvenigitaj de la intertempa prezidanto, S'ro A. Apwart, kaj interparoladoj pri la agado por nia lingvo estis interŝanĝitaj.

Enkondukante sian paroladon je la 15a aprilo, S'ro Victor Rutland klarigis, ke la anoncita temo, "Suben," nur estis elektita por ĝentiligi la veran enhavon kiu estas "La Infero." Skizante la konatajn opiniojn pri la infero kiel punloko priskribita en libroj de John Milton, Alighieri Dante, kaj John Bunyan, li donis la kredojn de l'malnovaj grekoj kaj romanoj, poste montrante la diferencon inter malnovaj egiptoj kaj nordlandanoj, kiuj respektive konsideris ĝin varmeka kaj malvarmeka loko. Eĉ pri la loko mem oni estas duba, diversaj rasoj aŭ kredante ĝin sub la tero, aŭ sur la suno, aŭ eĉ sur la luno. — La temo tiel intersigis la aŭdantaron, ke longa diskuto sekvis, kiun partoprenis pastro, teozofisto kaj nekredanto. Tre ĝuinda vespero.

S'ro Inocento Serišev instruis la membrojn la 22a aprilo per bonega parolado titolitan "Ideala kaj praktika flanko de Esperanto." Esperantismo, li diris, konsistas el materialistoj kaj idealistoj, ĉiuj konfese klopodante por unu celo, sed kun sperto en dekkvin landoj li rimarkis, ke la plejmulto tro multe propagandas kaj ne sufiĉe laboradas. Ni devas zorgi per metoda propaganda, sekvante unu paŝon per logika kontinuada. Centoj aliĝas al nia movado, sed pro malbona organizado kelkaj centoj foriras. Personoj aliĝas pro prepraĵa motivoj—komercistoj, scienculoj kaj aliaj—por trovi kion nuntempe? Nur tro ofte malgrandiganta intereso post

kelkaj renkontoj. Sangŭ tion kaj laboru laŭ sistemo, profitante la movadon per videblaj, praktikaj rezultoj! — Laŭ lia opinio ĉiu lando devus havi propran nacian ĵurnalon en kiu ĉiu temo interesigante la reston de la mondo estu publikigata: geografio, historio, industrio, edukado, k.t.p. tiamaniere kreante intereson en tiu lando. Aŭstralio havas tiel riĉan materialon kaj tiel grandajn eblecojn, ke ampleksa, ilustrita, esperantlingva revuo, sub zorga administrado, levis sukcesojn. Kiel ekzemplo, kion oni povas fari kun preskaŭ nenia mono flanke de Esperantistoj, nur utilante kapitalon de negocistoj, S'ro Serišev citis lian revuon "Oriento"; detale li klarigis la fondon, komencajn malfacilaĵojn kaj tuja sukceso, kies daŭrigo estis bedaŭrinde interrompita nur pro tieaj leĝaj konsideraĵoj. Konkludante la paroladon konsilis la Esperantistojn unuigi siajn fortojn por praktike montri la utilecon de nia lingvo; serioza homo bezonas materialon, ne paroladoj, kunvenoj kaj memadmiro. Organiza!

ESPERANTO AND THE FAIRS.

Esperanto is employed for advertising purposes by almost all the fairs of Europe, which have issued a number of propaganda publications in that language. A pamphlet recently published by the Leipzig Fair has been despatched to 42 different countries.—I.E.S.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Aŭstria Esperantisto, 2; Amerika Esperantisto, 5; Amikeco, 3; British Esperantist, 251; Brazila Esperantisto, 10-11; Belga Esperantisto, 3; Bulteno Antverpena, 1-2; Die Einheitsfront, 8 ĝis 11; Esperanto, 307; Heraldo de Esperanto, 13 ĝis 20; Holanda Esperanto-Pioniro, 1 ĝis 8; Itala Esperanta Revuo, 2; Internacia Radio Revuo, 1-2; International Language, 2; Internacia Medicina Revuo, 2; Internacia Esperanto-Servo, 1, 2; La Verda Ombro, 1; La Suno Hispana, 105; Literatura Mondo, 12; Libera Laboristo, 4; La Revuo Orienta, 3; La Progreso, 2; La Ora Epoko, 14; Munkaskultura, 3; Nova Sento, 1; Pola Esperantisto, 8, 1, 2, 3; Portugal Esperantisto, 2; Pro Transilvanio, 1; Revista del Atineo, 19; Senaciulo, 24; Svenska Esperantisto, 1; Wereldtall, 20 ĝis 22.

ESPERANTO, LINGVO DE RADIO.

Ĉiuj niaj legantoj certe konscias pri la graveco de la nuna propagando de Esperanto ĉe radiistoj. Necese estas, ke ni esperantistigu multajn radiistojn kaj, por tio, ke ni igu por ili Esperanton utila. Ankaŭ, ni devas radiistigi kiel eble plej multajn Esperantistojn, montrante al ili, kiel facile kaj interese estas konstrui mem radio-ricevilon, por ke multaj el niaj samideanoj aŭskultu la sendojn da la radio-stacioj kaj povu instigi ilin al uzado de Esperanto aŭ gratuli ilin pro ĝia uzado.

Tial ni kun ĝojo salutas la aperon de la unua numero de "Internacia Radio Revuo," monata organo de "Internacia Radio-Asocio." Dank' al ĝi Esperanto utilos ne nur al nunaj Esperantistoj, kiuj trovas en ĝi ĉiajn konsilojn necesajn, por konstrui mem malkare radio-aparatojn, sed ankaŭ al radiistoj ankoraŭ ne esperantistoj, kiuj legos en ĝi internaciajn informojn alie ne haveblajn, se nur ili konsentos dediĉi tre malgrandan penon al ioma lernado de Esperanto.

"Internacia Radio Revuo" ja celas kontentigi jenajn kategoriojn de legantoj:

1-e Esperantistojn, kiuj interesiĝas pri Radio, pri uzado de Esperanto en Radio, kiuj volas propagandi Esperanton inter radiistoj aŭ deziras fariĝi radio-amatoroj;

2-e Komencantajn radio-amatorojn, bezonantajn sisteman gvidadon en ilia laboro, emajn ekkoni la teorion, la "misterojn" de Radio, solvi multajn

dubindajn problemojn, kiujn ili renkontas dum sia laboro;

3-e Spertajn radio-amatorojn, kiuj volas trovi la kronikon de la tutmonda radio-movado, analizojn de plej interesaj artikoloj el la tutmonda radio-literaturo, lastajn novaĵojn kaj inventojn.

La unua numero entenas interalie originalan artikolon pri propagiĝo de la elektro-magnetaj ondoj, verkitan de nia fama malnova samideano, profesoro Mesny; konsilojn pri diversaj metodoj por instalado de antenoj; detalan priskribon de malmultekosta facile konstruebla ricevaparato; unuan artikolon el teorijaj babiladoj "Paŝo post paŝo"; humoran felietonon "Zoologia studo pri la radio-amatoro"; artikolojn de la ĉefredaktoro D-ro P. Corret, pri la propagando de Esperanto ĉe radiistoj kaj pri la Esperanta teknika radio-vortaro; detalan kronikon de la radiista kaj radi-esperantista movado, k. t. p. Bela kovrilo kaj multenombraj ilustraĵoj certe ne malplaĉos al la legantoj.

La unua numero estos senpage sendata al ĉiu esperantisto, kiu mendas ĝin de la eldonisto, sendante samtempe, por la sendelspezoj, unu internacian respondkuponon (por Francujo unu 30-centiman poŝtmarkon). Nepre mendu ĝin, ĉar dank' al ĝi vi povos tre malmultekoste konstrui vian propran aparaton.

La abonprezo por unu jaro estas nur duon-dolaro.

La abonmendojn sendu laŭ adreso: "Internacia Radio Revuo," E. Chiron, eldonisto, 40, rue de Seine, Paris-6e.

SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS.

It has been decided to hold the next Australasian Congress at Hobart during Easter, 1927.

All applications for information and subscriptions should be forwarded to the following local Secretaries:—

VICTORIA:—Mrs. E. S. Bigelow, 36 Kangaroo Road, Oakleigh.

NEW SOUTH WALES:—Mr. F. T. Simon, c/o Sydney Esperanto Society.

SOUTH AUSTRALIA:—Mr. W. L. Waterman, 26 Henley Road, Torrenville.

WESTERN AUSTRALIA:—Mr. C. Caine, 4 Norbert St., East Perth.

TASMANIA:—Mr. D. Guilbert, Lands Department, Hobart.

NEW ZEALAND:—Mr. W. H. King, Postal division, Secretary's Office, G.P.O., Wellington.

Secretary for Queensland to be announced later.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

BREDEJO DE ALIGATOROJ.

La bredejo de aligatoroj estas unu el la plej allogaj vidindaĵoj de St. Petersburg, Florida. Oni postulas eniran pagon da 25 cendoj, kaj centoj da personoj ĉiutage iras tien. Interne de la ĉirkaŭanta barilo aro de lignajbarakoj kun barilo de metal-fadeno donas ŝirmon al la aligatoroj, kaj ĉar ili estas amfibioj oni provizas multon da akvo por la kreitaĵoj. Tie oni povas vidi aligatorojn de ĉiu grandeco, de la malgrandaj junaj, ĵuse elkovataj el la ŝelo kaj nur nemultaj coloj longaj ĝis la tre aĝaj kies longo estas 14 aŭ 15 futoj.

Tiu bredejo jam funkciis dum dudek jaroj kaj la posedanto nun havas tie milon da aligatoroj. Oni kaptis la plimulton de la grandaj bestoj en truoj ĉe la bordo de rivero dum la vintra dormado. Ordinare ĉasistoj kaptas ilin por manĝi la voston, kiun ili konsideras tre bongusta. La aligatoro estas indiĝeno de Florida, kaj vivas en la riveroj kaj marĉoj de Meksikio kaj Usono. Ĝi estas iom malsimila de la krokodilo, kiu havas pli longan kaj ankaŭ pli fortan makzelon, kaj estas multe pli furioza. Oni ne povas certigi sin pri la sekso de aligatoro ĝis la besto havas la aĝon de 20 jaroj, kiam la ino por la unua fojo demetas ovojn, de 20 ĝis 60, kaj ĉiujn en unu tago, kaj faras same ĉiujare. La ovoj havas la saman koloron kiel la ovoj de kokino, sed ili estas iom pli grandaj. La aligatorino demetas la ovojn en nesto sur la tero kaj lasas ilin tie ĝis la varmo de la suno elkovas ilin.

Tuj kiam la junaj aligatoroj eliras el la ŝelo ili iras rekte al akvo, kaj tie ili povas sin nutri kaj singardi. Ili vivas ĝis granda aĝo. Ĉe la bredejo, la plej maljuna estas besto kiu aspektas kiel grandaĝulo, kies haŭto estas kovrata de verda musko, oni kalkulas havi la aĝon da 450 jaroj, sed kompreneble tio estas nur konjekto.

Ne eĉ unu aligatoro mortis ĉe la bredejo depost ties stariĝo, do estas evidente ke la kaptiteco ne malutilas al la bestoj. Ili ne mangas vegetaĵojn aŭ kuiritan viandon, sed dufoje semajne oni donas al ili nekuiritan fiŝon kaj viandon, escepte dum tri aŭ kvar monatoj vintre, kiam ili nek mangas nek trinkas, sed kuŝas dormante. Aligatoroj estas neatakemaj krom kiam ili timiĝas, kaj la laboristoj, kiuj estas nigruloj, povas fari

siajn taskojn kaj iri inter la bestoj sen timo de atako. Kelkfoje la aligatoroj batalas inter si kaj oni vidas la rezultaton sur tiuj, kiuj perdis kruron aŭ voston en la batalo, ĉar aligatoro neniam delasos tion, kion ĝi tenas, sed tordas la objekton ĝis kiam ĝi forrompis ĝin. La malferma povo de la makzelo estas tre malrapida kaj neforta sed la ferma povo estas tre forta.

La plej grandaj bestoj estas neaktivaj kaj ŝajne senvivaj, sed ili estas pli viglaj ol iuj supozas. Okazaĵo ĉe la bredejo tion bone vidigis. Vizitantino portis altvaloran Pekingan hundeton, kaj dum ŝi sin apogis ĉe la barilo kaj rigardis la bestojn la malgranda hundo falis el ŝiaj brakoj en la ĉirkaŭbarilon. Antaŭ ol oni povis kompreni kion okazis estis kraketo de granda makzelo kaj la hundeto malaperis. La sinjorino eligis vekrion sed kompreneble oni ne povis fari ion por savi ŝian dorlotiton. La aligatoroj montras iom da inteligento kaj iuj el ili faras respondon kiam oni vokas iliajn nomojn.

Oni uzas la haŭtojn de aligatoroj por fari ĉiujn specojn de saketoj, monujoj, ŝuoj, k.c. La haŭto de besto de aĝo de 30 ĝis 50 jaroj estas la plej taŭga por tiuj uzoj, tial la bestoj estas mortigitaj kiam ili atingas tiun aĝon.

AL REDAKTORO DE LA SUDA KRUCO.

Estimata samideano,

Mi legis kun plezuro la interesan artikolon de s-ro K. Takahashi, Del. U. E.A. en la Suda Kruco pri la nomoj; "Japan" kaj "Nippon."

Jes! Certe! Iam-maniere tute la nomoj kiel "Jih-pen-kuo," "Jipenkue," "Zipangu," "Cipango," "Zimpagu," "Sumbawa," "Cimbaba," "Cumbawi," "Zimpagua," "Cimpegua," kaj "Sumbagua" estis kelke de la teruraj maljustaj nomoj kiuj estis la origino de la nomo "Japan."

Sed, la unua origino de la eraro ne estis la kulpo de Marco Polo sed de la gloro kartografisto Fra Mauro kiu metis la insulojn de Java, Sumbawa, Cipango, kaj aliaj, en la Nordan duonsferon.

Kiam mi skribis mian libron "Discovery of Australia" mi estis la unua kiu eltrovis tiujn ĉi erarojn.

Via sincere, Geo. Collingridge de Tourcey.

Hornŝy, N.S.W.

ESPERANTO AND SCIENCE.

Esperanto is penetrating more and more into scientific circles. M. R. Mesny, Professor of Hydrography in Paris, who has just been awarded a prize by the Academy of Sciences, recently delivered a lecture in Esperanto in the Sorbonne on "Present-day ideas about matter." The lecture was highly successful and will be followed by others.

Physicians and chemists in the Far East are showing particular interest in Esperanto. Esperanto societies exist in a number of colleges and universities. A whole series of medical publications in Esperanto has recently appeared in Japan. The review "Records of the Medical Faculty of Imperial University of Tokio" frequently contains articles in Esperanto by eminent professors of the Faculty.

On the occasion of the Congress of Physicians of the Far East, held in Tokio last October, and attended by 520 physicians, the Japanese Doctors T. Ogato and M. Murata, professors of Tokio University, read reports on various diseases in Esperanto. Dr. Fujinami, also a professor of Tokio University, and a Chinese, Mr. Cheng Fan Tsu, also spoke in Esperanto.

—I.E.S.

Those Official Languages. — A writer in the Daily Press reminds us that a demand will shortly be presented to make German an official language of the League of Nations together with English and French. It is understood that Italy and Spain will follow suit; and then it will not be long before the rights of the smaller nations have to be considered. The solution is obvious; and though the route is unnecessarily circuitous, it seems to us that the confusion and jealousy resultant upon the use of one or more national tongues will lead them on to the right road before long.—International Language.

Esperanto in Finland. — The most recent example of the support given to Esperanto by the Finnish Government is found in the news that the Minister of Education has granted a subsidy of 6,000 marks for the formation of an Esperanto vacation course for teachers and is undertaking the circulation of a pamphlet in Esperanto written by Mr. E. Setälä, Professor of Philology in the University of Helsingfors and at present

Minister of Foreign Affairs of Finland.—International Language.

LA ĈEFAJ VOJOJ DE LA ESPERANTA PROGRESO EN POLUJO.

Esperanta movado efektive tempe de la Oka en Krakovo havis specifikan distingon de hodiaŭa:—ĝi estis ĝenerala. Tio estas oni aranĝis kursojn, kiuj partoprenis kune profesoro kaj lernanto, laboristo kaj fabrikdirektoro. En unu Esperanta societo estis anoj el ĉiuj profesioj kaj klasoj.

Nuntempe post la Granda Milito estas alie. Unue el ĝenerala laboro apartiĝis junularo. Junaj mensoj ne povis observadi tro por ili malrapidan laboron de pli maljunaj. Iliaj fortoj kaj flamaroj devis havi propran societon por labori laŭ propraj vidpunktoj kaj manieroj. Plej grandaj centraĵoj de Esperantista ĝejnularo troviĝas en Krakovo estro M. Ziomek kaj Boryslaw e. Ringel. En la lastaj monatoj fervorege oni propagandas en laboristaj rondoj. Tiu ĉi klaso staranta sur punkto: "kameradoj de ĉiuj landoj unuiĝu," tre dolore sentas la mult— kaj divers—lingvecon de l' mondo. Tial ili estiĝas nune plej viglaj Esperantistoj. Sur tiu ĉi vojo atendas nin tre grava sed sukcesplena laboro. Laborista esperanta movado kreskas en Lwow/e. Zausmer/kay Sosnokiec/e. B. Czechowski/. En Sosnowiec post granda venko de socialistaj kandidatoj ĉe elektoj al urbestro Esperanto estas instruata en "Urba Popolo Universitato." Antaŭaj ĝeneralaj Esperantistaj societoj fariĝis nune urbanoj de komercistoj, industriistoj ktp. Antaŭ ili, tamen, ne malfermiĝas ĉe ni tro granda laborkampo. Ili precipe estos kunularaj societoj. En stato de organizado apenaŭ troviĝas universitatanoj kaj precipe studentoj el medicinaj fakoj, inter kiuj laboras precipe Tekanoj. El fakaj organizoj plej intensive laboras kuracistoj, organizitaj en Tekano en Krakovo, d-ro Blasberg kaj Prof. Bujwid, en Varsovio, d-ro Robln /kaj instruistoj, malpli da policistoj, fervojistoj kaj aliaj. Tre miinda kaj interesa afero estas, ke en Polujo, kies regnantoj en 80 o/o estas vilaĝanoj kaj en 65 o/o katolikoj, en tiuj ĉi rondoj estas preskaŭ nenia laboro.

For services rendered in the cause of esperanto, Mr. J. S. King, of Gisorborne, has been elected delegate of

the Universal Esperanto Association for the province of Auckland, which includes Gisborne.

HERE AND THERE.

At Mr. P. Steven's broadcasting station on Thursday evening, Mrs. J. L. King sent the following message dealing with the radio roll call: "One of the many interesting features at the fourth annual radio exposition and fair recently held at Grand Central Palace, New York, was a world radio roll call. The Radio Corporation of America broadcasted a call in Esperanto from the transmitting station at the exposition, and within a minute acknowledgements were received from the principal stations in several European countries, Japan and Argentine.—Gisborne Times, 6/3/26.

Internacia Medicina Revuo deponita sur tute januaro 1926 estas eldonita sur tute novaj bazoj. Ĉefredaktoro: Profesoro Vanverts el Lille. Kunlaborantaro el ĉiuj landoj. Enhavo: originalaj artikoloj; aŭtoreferatoj; referatoj; komunikaĵoj de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Diversaĵoj.

ESPERANTO AND THE PRESS.

The International Congress of the Technical Press, held in Paris during the present winter, adopted Esperanto as an international auxiliary language, side by side with the other languages used in the Congress. It also passed a resolution recommending the technical press to publish summaries of articles in Esperanto.

The great French organ of the leather industry, "Le Cuir," and the economic organ of the Frankfurt-on-Main Fair, "Der Bund," have for some time past published articles in Esperanto.

I.E.S.

ESPERANTO AND THE POST.

The press has already alluded to the appearance of a Russian post-card with a heading in Esperanto and of a memorial stamp in Esperanto.

The Russian Administration of Poste has issued post-cards with the heading in Esperanto and in the various languages, used in the Union of Soviet Republics, such as Armenian, Tatar and White Russian.

Maksimiljano Ziomek, kun geamikoj korespondados, interŝanĝados ĉiamaniere kun ĉiuj gesamideanoj. Tuj respondo certeg. Krakovo, Vincent oĵola 5, Polujo.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunveno: ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretario: F-ino I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send, for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.